# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo** **februaro 2025**

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Madrida Esperanto-Liceo (MEL) okazigos sian ĝeneralan kunvenon en tiu ĉi monato. Jen la kunvoko, kiun aparte ricevos ĉiuj anoj kun la koncernaj dokumentoj:

La prezidanto alvokas ĉiujn membrojn de Madrida Esperanto-Liceo por la ordinara ĝenerala asembleo okazonta la lundon 24an februaro 2024 je la 18:00 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko) en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro 13-3-7 de Madrido. Se vi deziras partopreni rete sciigu tion al ni por ke ni donu la ligilon.

Oni pritraktos la sekvajn aferojn:

1.- Raporto pri evoluo de la membraro

2.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2024

3.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-raporto 2024

4.- Decido pri la jarkotizoj 2026

5.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2025

6.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-programo por 2025

7.- Demandoj, petoj, proponoj

8.- Redaktado, laŭtlego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Se vi ne povos ĉeesti, nek persone nek rete, memoru ke vi povas transdoni vian voĉdon-rajton al alia ĉeestonta kunsentanta membro, pere de mesaĝo al: madrid@esperanto.es.

La prezidanto.

Se vi ne estas membro, por aliĝi al MEL sufiĉas ke vi plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es. La kotizo estas nur 12€ jare.

Kaj se vi jam estas ano, ne forgesu pagi vian kotizon, ĉu en la sidejo ĉu en la konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero de konto: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

## MULTAJ AKTIVAĴOJ EN SEGOVIO

Multaj tre interesaj aktivaĵoj okazos en februaro en la najbara provinco Segovio, organizitaj de la Segovia Esperanto-Asocio, kunlabore kun la Publika Biblioteko de la provinca ĉefurbo.









De la 3-a de februaro ĝis la 31-a de marto estos vizitebla en la publika biblioteko (C. Los Procuradores de la Tierra, 6) la ekspozicio: "Esperanto: de utopía a realidad", nova versio, plibonigita kaj aktualigita, de la paneloj iam pretigitaj de HEF.

La ekspozicio estos prezentata per prelego, kun sama titolo, la 7-an de februaro, je la 19-a horo samloke, kun partopreno de Toño del Barrio kaj Miguel Fernández. Se iu madridano deziras ĉeesti, bv kontakti kun MEL, por organizi komunan vojaĝon al la najbara urbo.

Fine, oni anoncis la okazigon de kurso de Esperanto, gvidotan de David Trigo. Ĝi disvolviĝos ĉiujn merkredojn, ekde la 12-a de februaro, de 19:30 ĝis 20:45, ankaŭ en la Publika Biblioteko de Segovia. Aliĝo: ĉe la biblioteko aŭ telefone al 921 463 533.

Eblas spekti prezentadon en loka televidkanalo tie ĉi: https://youtu.be/sd3LXjQ0yhU?t=148.

Bonvolu disvastigi inter segoviaj amikoj.

## JAM 111 ALIĜINTOJ AL LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

En la momento de pretigo de tiu ĉi bulteno, jam 111 homoj aliĝis al la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio komence de majo (kaj kreskante).

Ni memorigas ke ĉiujn informojn (pri urbo, sidejo, transporto, loĝado, komuna bankedo, ekskursoj, ĉefaj programeroj…) oni povas trovi en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/, kun la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj.

## JAM EBLAS ALIĜI AL LA LIBERAJ EKZAMENOJ DE ESPERANTO EN UNED

La 13-an de januaro komenciĝis la aliĝperiodo de la "liberaj" ekzamenoj de Esperanto en UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia). Ĝis la 31-a de marto eblos aliĝi al la ekzamenoj de niveloj A2 kaj B1 por ricevi la saman atestilon kiun studentoj akiras trapasinte la respondajn lingvokursojn de UNED post tuta lernojaro. La ekzamenoj okazos de majo ĝis junio. La aliĝo al libera ekzameno kostas 80 eŭrojn kaj ne postulas hispanan civitanecon aŭ studentecon en alia ajn programo de UNED.

## MADRIDAJ RENKONTOJ

La unuasabata kunveno okazos la 1-an de februaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida. Kaj atentu: MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*. Trovu nin nun ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com